


# Usona Esperantisto

Dumonata bulteno de Esperanto-USA • Numero 2011:1 (jan-feb)

American  
Esperantist  
★  
Bi-monthly bulletin of Esperanto-USA • 2011:1 (Jan-Feb)



## Ĉi-numere:

- Anoncoj pri MEKARO kaj la Landa Kongreso de E-USA
- Tradukdefio: E. E. CUMMINGS
- Vizitu la Valon de Morto
- Kaj multe pli!

Debutas du novaj filmetoj en Esperanto (pĝ. 8)

## Usona **Esperantisto**

Dumonata bulteno • *Bi-monthly bulletin*

Vol 50, No 1 — 2011:1 (jan–feb)

Redaktisto • *Editor*: HOSS FIROOZNIJA

Sendu kontribuojn al • *Send contributions to:*

✉ bulteno@esperanto-usa.org

✉ Usona Esperantisto, c/o Hoss Firooznia  
CPU 271205, U. of Rochester  
Rochester, NY 14627-1205, USA

*Usona Esperantisto (American Esperantist) is the bulletin of Esperanto-USA. We welcome contributions in both Esperanto and English; please use email if possible and include your name, your email/postal address, and a closeup photo. With other photos please include the name of the photographer and subject(s), location, and date. We will return materials by mail if you include a self-addressed, stamped envelope.*

*You may reprint content from this publication if you give credit; please send a copy of any reprinted materials to the address above. Opinions expressed are those of the individual authors and do not necessarily reflect the views of Esperanto-USA or the editor.*



*Usona Esperantisto estas la bulteno de Esperanto-USA. Ni bonvenigas kontribuojn kaj en Esperanto kaj en la angla lingvo. Prefere uzu retroŝtonon, kaj aldonu viajn nomon, (ret)poŝtadreson kaj foton de via vizaĝo. Kun aliaj fotoj bonvolu aldoni noton pri la dato, loko, kaj nomoj de foti(n)toj. Ni perpoŝte resendos materialojn se vi sendas mem-adresitan, afrankitan koverton.*

*Oni rajtas reaprigi materialojn de la bulteno kun fontindiko. Bonvolu sendi al la supra adreso ekzemplerojn de ajna republikigita materialo. Opinioj esprimataj en la bulteno apartenas al la individuaj aŭtoroj, kaj ne nepre spegulas la vidpunktojn de Esperanto-USA aŭ la redaktisto.*



**esperanto  
usa**

**Centra Oficejo • Central Office**

✉ PO Box 1129, El Cerrito CA 94530 USA

☎ 510.653.0998; 2510.653.1468

✉ info@esperanto-usa.org

http://esperanto-usa.org

**Direktoro • Direktoro, CO:** William B. HARRIS

**Prezidanto • President:** Philip G. DORCAS

**Vicprezidanto • Vice President:** Tim WESTOVER

**Sekretario • Secretary:** Steve BREWER

**Kasisto • Treasurer:** Christopher ZERVIC

**Aliaj estraranoj • Other board members:** George

BAKER, Mar CÁRDENAS, D. Gary GRADY, ROS Haruo, Tor

KINLOK, Orlando E. RAOLA, Julie SPICKLER, Ĝan STARLING,

Julie WINBERG

## Donate to the 777 Fund

Since 1998, UEA has been an accredited non-governmental organization (NGO) at the United Nations. The accreditation allows UEA representatives to attend conferences at the UN and submit recommendations on the economic and social effects of language policy. Equally important, they meet with members of the UN Secretariat—including the Secretary-General—on an unofficial basis.

The cost of operating the UN office is about \$375 a month. This amount covers rent, telephone, and miscellaneous expenses (the office is staffed by unpaid volunteers). Support comes from donations to UEA from Esperantists around the world, and many members of Esperanto-USA have donated money for this purpose. Recently we agreed to set up a fund accepting these donations in support of the UN Office. As a result, **all donations to the fund are tax-deductible.**

For more information about the Esperanto office at the UN, please contact Neil Blonstein at <neil\_nachum@yahoo.com>.

## Forpaso

Ni bedaŭras la forpason de niaj membroj:

- **Gerald J. NEWALL**, la 3-an de junio, 2010 en Sandiego, Kalifornio.
- **Doris T. CONNOR**, la 16-an de oktobro, 2010 en Portlando, Oregono.
- **Edwin M. SWENGEL**, la 22-an de oktobro, 2010 en Long Beach, Kalifornio.
- **Richard KOLLIN**, la 7-an de novembro, 2010 en Oakland, Kalifornio.
- **Hyman MELTZ**, la 1-an de februaro en Sarasota, Florido.
- **Henry STUDER**, la 10-an de februaro.

**We need you!** Your membership fees help promote Esperanto and provide services to speakers and students across the country. Members receive the bi-monthly bulletin *Usona Esperantisto*, the *Membership List*, discounts from the Book Service, access to online resources (mailing lists, blog space, etc.) and a discount at the national convention. Please join (or renew) today!

Return with payment to: **Esperanto-USA, P.O. Box 1129, El Cerrito CA 94530**

Name: \_\_\_\_\_

Address: \_\_\_\_\_

City & State: \_\_\_\_\_

Postal code & Country: \_\_\_\_\_

Phone & Fax: \_\_\_\_\_

E-mail: \_\_\_\_\_

Birthdate (M/D/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_/\_\_\_\_ Ham radio call sign: \_\_\_\_\_

In the member list, don't publish my:  address  phone  fax  email

Send me info on joining the *Universala Esperanto Asocio*

Please check **one** category of membership/support:

- Friend of Esperanto ..... \$10.00  
*(not a membership, but you receive 3 issues of the newsletter)*
- Youth *(you must be under 27)* ..... \$20.00
- Limited Income ..... \$20.00
- Individual ..... \$40.00
- Family ..... \$60.00
- Sustaining ..... \$80.00
- Life *(birthdate required)* ..... \$800.00

Credit card info:  Visa  Mastercard

Number: \_\_\_\_\_ Expires(M/Y): \_\_\_\_/\_\_\_\_

Card verification #: \_\_\_\_\_ *(three digits on back of card, or on front for AmEx)*

## Regional events

For a much longer and comprehensive list of events around the world, see <http://www.eventoj.hu/2011.htm>.

### February 26 – 27 (Louisville, KY)

#### **Seminar on the Literature of Esperanto**

Coinciding with the 39th annual *Louisville Conference on Literature and Culture* at the University of Louisville. Seminar languages will be Esperanto and English. Presenters include Ulrich Becker, Duncan Charters, Humphrey Tonkin and Tim Westover. For more information, see <http://esperantic.org/en/communications/news?n=26> or email [bonnie.fonseca@louisville.edu](mailto:bonnie.fonseca@louisville.edu).

### May 21 – 23 (Kingston, Ontario)

#### **Mid-Canada Gathering (MEKARO)**

The *Mez-Kanada Renkontigo* occurs each May in a different Canadian city. MEKARO is a weekend of tourism via Esperanto; it provides opportunities to learn about the host city, sample local delicacies (and beer), and make friends with other Esperanto speakers. Situated midway between Montreal and Toronto, Kingston was the first capital of Canada. It offers a wide selection of restaurants, tourist sites, museums, and more. For more information, see <http://mekaro.ca>.

### June 17 – 20 (Emeryville, CA)

#### **59th National Conference, Esperanto-USA**

This year's *Landa Kongreso* meets right on the San Francisco Bay, next to the impressive Bay Bridge. The theme is "Esperanto: the 'Other' Green Movement". Although commonly associated with environmentalism, the idea of a green movement has been part of Esperanto for more than a century. Do these two "green" movements have shared interests? Or should Esperanto be just a language, without any social, cultural, or humanist ideals? Come discuss these topics with us in a region at the forefront of both green movements! For more information, contact [kkus2011@esperanto.org](mailto:kkus2011@esperanto.org).



## Local groups

Below are contact addresses for some of the larger local groups that meet regularly; for more complete info, see our website.

### California

**Sacramento:** <http://esperanto.org/us/esos>

**San Diego:** <http://groups.yahoo.com/group/EsperantoGrupodeSanDiego>

**San Francisco:**

<http://esperanto.org/us/SFERO>

**Santa Barbara:** [dorothyjeanh@gmail.com](mailto:dorothyjeanh@gmail.com)

**L.A.:** <http://fizzylogic.com/users/bulbul/esperanto/konversacia-rondo>

**Colorado** (Longmont) <http://ek-ek.org>

**Connecticut** (Wallingford) <http://esne.net>

**District of Columbia** <http://esperantodc.org>

**Georgia** (Atlanta) <http://esperanto-atlanta.org>

**Hawaii** (Honolulu)

<http://esperanto.org/us/Honolulu>

**Idaho** (Boise) <http://terpomuloj.org>

**Illinois**

**Champaign-Urbana:** <http://ekoci.org>

**Chicago:** <http://esperanto-chicago.org>

**Maine** (Bangor, Houlton) <http://esne.net>

**Massachusetts** (Acton, Amherst, Cambridge, Northampton) <http://esne.net>

**Missouri** (St. Louis) <http://esperanto-stl.org>

**New Jersey** (Princeton)

<http://esperanto-nj.tripod.com>

**New York**

**New York:** <http://esperanto-nyc.org>

**Rochester:** <http://esperanto.lodestone.org>

**Ohio** (Cincinnati) <http://ligileto.freeshell.org>

**Texas**

**Austin:** <http://esperantaklubo.konfuzo.net>

**Dallas:** <http://esperanto-tx.org>

**Virginia** (Hampton Roads) <http://bonege.com>

**Washington** (Seattle)

<http://seattleesperanto.org>

**Wisconsin** (Madison)

<http://groups.google.com/group/esperanto-societo-madison>

## Venu al MEKARO-2011 en Kingstono, Ontario!

**MEKARO** estas la mez-kanada renkontiĝo de esperantistoj, kiu okazas ĉiujare en majo en malsama urbo de Ontario kaj Kebekio (alternante inter la provincoj). MEKARO estas turisma semajnfino en Esperanto por lerni pri la gastiga urbo, gustumi la lokajn frandaĵojn (kaj bierojn), amikiĝi kun aliaj esperantistoj kaj pasigi tempon en bela varma esperantista etoso.



Ĉi-jare la aranĝo okazos en **Kingstono, Ontario, la 21-23-an de majo**. Kingstono estas historia, vizitinda mezgranda urbo, kiu situas mezvoje inter Montrealo kaj Toronto, trans la lago Ontario de Novjorkio. Kingstono estis la unua ĉefurbo de Kanado, kaj ĝi proponas multajn elektojn de restoracioj, turismaj vidindaĵoj, historiaj muzeoj, kaj pli! Ni elkore bonvenigas vin viziti nin, dividi viajn spertojn kun aliaj esperantistoj kaj ĝui la etoson de tiu ĉi bela parto de Kanado!



Ni havas plenan programon de spertindaj aktivaĵoj, inkluzive la fantoman promenon, esploron de granda fortikaĵo kaj viziton al muzeo en la originala domo de la unua ĉefministro de Kanado, sinjoro John A. MACDONALD. La organizantoj rekomendas kunporti pluvombreton, ĉar la programo okazos eĉ se pluvos!

La kotizo estas \$50 por plenkreskuloj kaj \$30 por infanoj. Ĝi inkluzivas programon kaj eniron en kvar muzeojn.

Pli da informoj kaj aliĝilo haveblas ĉe

**<http://mekaro.ca>**

Ĝis la revido en majo!

*Maldekstre: parto de la urbaj fortikaĵoj apud la rivero Sankt-Laurenco; supre: la urbodomo. Fotoj danke al la registaro de Kingstono.*



# La 59-a Landa Kongreso de Esperanto-USA 17–20 junio en Sanfrancisko, Kalifornio

E

Temo: *Esperanto, la "alia" verda movado*

E

Aliĝu rete, ĉe

<http://esperanto.org/x/LKUS2011>

Bonvolu rimarki la daton korektitan: la kongreso komenciĝos per la Interkona Vespero vendredon, la 17-an de junio, kaj finiĝos tagmeze lundon, la 20-an.

## PROGRAMO

- ★ Koncerto de Nataŝa kaj Ĵomart
- ★ Prezento de nova filmo pri la Esperanto-movado fare de Sam GREEN, reĝisoro de *Utopia in Four Movements*
- ★ Infankongreseto organizita de Amanda Higley SCHMIDT
- ★ Diskuto pri "La Stato de Esperanto ĉe la Interreto"
- ★ kaj multe pli!

## KONTRIBUU AL LA PROGRAMO!

Ni bonvenigas prelegantojn, muzikistojn, aktivulojn, ktp. Sendu viajn proponojn al <lkkus2011@esperanto.org>.

## EKSKURSOJ

Ekskursoj okazos dum vendredo kaj lundon posttagmeze. Eblos pli longaj ekskursoj al Yosemite aŭ la Vina Regiono post la kongreso. Por pli da informo, bonvolu kontakti al Andrea MONTICUE <dreah@mac.com> aŭ Lusi HARMON <lusiharmon@esperanto.org>. Ne pre planu por la ekskursoj kiam vi aĉetas vian flugbileton!

## LOĜADO

Ni kongresos ĉe *Woodfin Hotel Emeryville*. Eblas rezervi ĉambron rete, per la adreso supre. Se vi deziras dividi ĉambron kun alia kongresano, sendu mesaĝon al <lkkus2011@esperanto.org> kun temlinio "Samĉambrano serĉata".



La bela hotelo *Woodfin Hotel Emeryville*, kie ni kongresos. Ĝi situas apud la golfo de Sanfrancisko kaj la impona Golfo-Ponto kiu kunligas la urbojn Sanfrancisko kaj Oakland. (Foto danke al hotelo *Woodfin*.)

# Antaŭkongresaj anoncoj

## Ĉu vi prezentos ĉe la LK?

Ĉiu kompetentulo, kiu deziras prezenti aŭ gvidi programeron dum la venonta Landa Kongreso bonvolu sendi proponon al mi kun jenaj informoj:

1. Nomo(j) de la prezentonto(j) en la formo, en kiu oni volus, ke ili aperu en la programo
2. La tem-titolo de la programero
3. Konciza priskribo de ĉiu proponata programero
4. Preferinda(j) tago(j) kaj tempo-intervalo(j) por ĉiu programero
5. Dezirita daŭro de la programero
6. Koncizaj informoj pri ĉiu prezentonto por publikigo kaj anoncoj
7. Necesajoj kaj specialaj bezonoj por la programero

Pro eventualaj konfliktoj inter diversaj petoj, mi ne garantias, ke mi povus plenumi ĉiun detalon de la proponoj, sed mi penas laŭeble sekvi viajn rekomendojn kiel eble plej diligente. Anticipan dankon!

—Alexander SHLAFER, Programestro  
<afikommon-e@yahoo.com>

## Junula programo ĉe la LK

[Jen noto de Amanda Higley SCHMIDT, kiu organizas junulajn/familiajn programojn por la Landa Kongreso. Ĉu vi volas proponi programeron? Nepre kontaktu ŝin. —Red.]

Ĉu vi ŝatas amuziĝi? Ludi, danci, kanti, kaj esti aktiva? Ekskursi? Nu, jen la kongresa programo por vi. Komencantoj, infanoj, junuloj, kaj junkoruloj, venu ludi kun ni! Nia familio parolas Esperanton hejme, kaj ni invitas vin veni ludi kun ni dum kelkaj tagoj. Ni dividos kun vi tabloludojn, kantojn kaj dancojn, rakontadon, aktivajn cirkoludojn, ekskursojn al parkoj, bestoĝardeno, aŭ gol-fobordo... ktp! Kaj se vi havas ideon por amuza programero, bonvolu proponi ĝin kaj ni aldonos ĝin al niaj planoj. Ni bonvenigas ĉion amuzan... ĉar per ludado, oni plej bone lernas la lingvon.

—Amanda Higley SCHMIDT  
<amandahigley@principia.edu>  
(916) 962-1548

## Ne nur por Oprah

[Libroamantoj: sendu ideojn al Russ! —Red.]

Plaĉas al mi la ideo, ke monatojn antaŭ Esperanto-evento interesatoj interkonsentu pri iu libro por legi, por ke surloke ili povu diskuti ĝin vizaĝ-al-vizaĝe. Do simila afero al "libroklubo", aferoj kiuj oftas en multaj urboj, sed malpli facile aranĝeblas en Esperantujo pro nia diasporeco.

Laŭ mi la ideo bonegas kaj ŝajnas tute taŭga por la venonta landa kongreso de Esperanto-USA. Nur necesus interkonsenti pri kiu libro... ĉu klasikaĵo kiel la zamenhofa traduko de *Hamleto*, ĉu moderna romano kiel *Dis!* de Johansson, ekzemple? Ĉu gravus, ke la libro ekzistu en senpaga, elŝutebla formo?

—Russ WILLIAMS  
<cxiomortas@gmail.com>

## Debutas novaj E-filmetoj

FORT COLLINS, KOLORADIO — Post unujara studado, Simono KEITH sukcesis diplomigi pri klasika animacio ĉe la filma studejo de Vankuvero (*Vancouver Film School*) en Brita Kolumbio, Kanado. Post intensa eduko pri la principoj kaj fundamentoj de animacio, li dediĉis pli ol kvar monatojn al kreado de filmo tradicie desegnita sur papero. La rezulto estas *Ĉapeloj*, la unua animacia filmo en Esperanto. Li poste kreis plian filmon, *Neĝuloj*, en nur kvar semajnoj uzante komputilajn ilojn.

Ambaŭ filmoj debutis ĉe lia diplomiga ceremonio, la 17-an de decembro, 2010. Proksimume dek esperantistoj venis por spekti. La 10-an de februaro, *Ĉapeloj* gajnis premion en loka filmkonkurso en Fort Collins.

Nun eblas spekti ambaŭ filmojn rete, ĉe <<http://cxapeloj.blogspot.com>>.

## Raporteto pri JES

*Raportas Russ WILLIAMS*

BURG, GERMANUJO — Iom pli ol 200 homoj venis al Burg, Germanujo por la novjara renkontiĝo JES (Junulara E-Semajno). Tio estis la dua JES, post kiam la longtradicia germana IS (Internacia Seminario) kaj pli nova pola Ago-Semajno (AS) kuniĝis, pro tio ke multaj homoj sentis vojaĝemon al ambaŭ novjaraj eventoj. (Antaŭ jaro la unua JES okazis en Zakopano, Polujo.)

Kiel kutime okazis multaj koncertoj, prelegoj, diskutrondoj, ekskursoj, filmoj, trinkejo, gufujo, ludado, ktp. (Mi kaptis la okazon ludi goon kun diversaj homoj!) Plejmultaj homoj estis germanoj kaj poloj, sed estis ankaŭ multaj francoj,

ukrainoj, rusoj, ktp. Ĉeestis ankaŭ kelkaj anglalingvanoj krom mi, de Britujo kaj ankaŭ de Usono kaj Kanado (sed tiuj landanoj nun loĝas en Eŭropo). De pli for venis diversazianoj kaj eĉ brazilano (kiuj kombinis JES-on kun eŭropa vojaĝado) do ja estis sufiĉe internacia evento.

La manĝoservo ofertis ne nur vegetaran sed eĉ veganan elektojn, kiujn multaj homoj profitis – jen plaĉa signo de progreso laŭ mi kiel vegano. La ĉefa JES-ejo estis najbara al la amasloĝejo, sed la manĝoservo kaj junulara gastejo estis 15-minutan marŝon for, do multaj homoj piediris tien kaj reen almenaŭ du fojojn tage tra la vintra neĝo. Unue estis plendoj, sed efektive oni rapide alkitimiĝis kaj ĝuis iom da ĉiutaga ekstera promonado, ne nur por la ekzercado sed ankaŭ por ĝui la belan vilaĝan pejzaĝon. Malkiel en grandaj urboj kie neĝo rapide fariĝas griza malpura glacio, la neĝo en Burg restis magie fabele blanka la tutan semjanon, kiu donis bonan vintran etoson eĉ por eks-teksasano kiel mi.

## Senintenca esperantajo?



Foto danke al Chris ZERVIC.



## Pli pri relativeco kaj maso

Mi ĝojis legi la artikoleon pri relativeco (en *UE 2010:6*). Mi nur bedaŭras ke la artikolo emfazis la ideon de “relativeca maso”, kiun ne plu uzas fizikistoj. Estas vere ke uzante la faman duan leĝon de Newton,  $F = ma$ , relativeca maso permesas facile sed bedaŭrinde fuŝe “klarigi” ke aplikata forto pligrandigas la mason, dum la akcelo malkreskas, kaj do la rapido de objekto neniam povus atingi la rapidon de la lumo,  $c$ . Alia versio de la argumento estas: la movokvanto rilatas al la maso kaj la rapido tiel ke  $p = mv$ . Aplikata forto ja kreskigas la movokvanton, sed dum la rapido malrapide kreskas al (sed ne ĝis) la rapido de la lumo, estus la maso kiu kreskadus senlime, ne la rapido.

Nu, la ĝenerala ideo estas ĝusta, sed la situacio estas iom pli komplika. En la speciala teorio de relativeco,  $F = ma$  iĝas  $F_x = \gamma^3 ma_x$  en la direkto de la movado, sed  $F_y = \gamma ma_y$ , kaj  $F_z = \gamma ma_z$  en aliaj direktoj, kie  $\gamma = 1 / \sqrt{1 - v^2/c^2}$ . Tie ĉi  $m$  estas la ripoz-maso, kiu ne varias, sed kaŭze de la faktoro  $\gamma$ , kiu ja pligrandigas senlime kiam la rapido  $v$  kreskas, neniu forto povus akceli objekton ĝis la rapido  $c$ . La problemo estas ke la konduko varias laŭ la direkto de la forto, kompare kun la direkto de la movado. Klopodante reteni la ekvacion  $F = ma$ , dum kelka tempo oni eĉ parolis pri “longituda (laŭlonga) maso” ( $\gamma^3 m$ ) kaj “transversa maso” ( $\gamma m$ ), sed estas vere malfacile akcepti ke la maso estu malsama en malsamaj direktoj, kaj hodiaŭ fizikistoj kontentas pri la ideo ke  $F = ma$  kaj  $p = mv$  estas nuraj proksimumoj. Fakte eĉ Newton uzis ne  $F = ma$  sed alian ekvacion,  $\vec{F} = d\vec{p}/dt$ , t.e., la forto egalas al la kvanto de variado de la

movokvanto, kaj la ununura ŝanĝo necesa por “relativecigi” ĝin estas je la difino de la movokvanto mem:  $\vec{p} = \gamma m \vec{v}$ . Per ĉi tiuj du ekvacioj oni vidas ke aplikata forto povas senlime pligrandigi la movokvanton, sed estas fakte la faktoro  $\gamma$  kiu pligrandigas, kvankam la rapido  $v$  malrapide alproksimiĝas al  $c$  kaj la ripoz-maso  $m$  tute ne ŝanĝiĝas. Tiel oni povas diri ke rapidega objekto ja havas grandegan relativecan movokvanton, sed ni ne plu pensas ke estas la maso kiu ŝanĝiĝas – kaj ŝanĝiĝas malsame laŭdirekte! Kaj estu dirite ke en la 4-vektora versio de la teorio, kie spaco kaj tempo estas kombinitaj en “spacotempo”, la ekvacioj estas multe pli simplaj. Parenteze, Einstein mem decidis ke la ideo de relativeca maso estis forigenda. Referencoj kaj aliaj informoj tiurilate troveblas ĉe la anglalingva Vikipedio (serĉu “Relativistic Mass”). Bedaŭrinde la paĝo ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto.

— Ken CAVINESS, <caviness@southern.edu>  
Prof. pri Fiziko, Southern Adventist University

[Aŭtomate tradukita versio de la vikipedia paĝo troviĝas ĉe <<http://epo.wikitrans.net>>. Post iom da homokula polurado, ĝi povus esti preta por la Esperanta Vikipedio. Jen projekto por niaj verdaj fizikemuloj... —Red.]

### Skribu al Usona Esperantisto!

Bonvenaj estas viaj komentoj (en la angla aŭ en Esperanto) ĉu pri Esperantujo, ĉu pri la lingvoproblemo, aŭ ĉu pri materialo iam aperinta en *UE*. Leteroj estu prefere ne pli ol 300 vortojn longaj; anoncoj, 400. Sendu viajn mesaĝojn al:

**bulteno@esperanto-usa.org**



# La Valo de Morto

Anna kaj mi vizitis multajn naciajn parkojn en la okcidenta parto de Usono kaj ili plejparte enamigis nin. Plej lastatempe ni vizitis la parkon Valo de Morto (angle *Death Valley National Park*), kaj ĝi ja estis ege vizitinda. Ĝi estas konata kiel varmega loko kun tre seka aero; vere, dum somero, la temperaturo superas 120°F dum la tago. Tamen vintre ĝi estas milda. Dum nia vizito en frua marto, la temperaturo atingis 50°F nokte kaj 80°F tage. La pejzaĝo estis tre bela.

Malbonakva Baseno (*Bad Water Basin*) estas la plej malalta loko en Nord-ameriko, je 282 futoj sub la marnivelo! Estis tre interese piediri sur la kamparo kaj ekvidi indikilon sur la klifo super ni, montrantan la marnivelon. Kaj la erozio faris belegajn klifojn kaj buntajn grundojn. La vojaĝo tra Paletro de Artisto (*Artist's Palette*) alproksimigis nin al belegaj koloroj. Aldone, la Vidaĝo de Dante (*Dante's View*), pli ol 6 000 futojn super la valo, prezentis belegajn pejzaĝojn. Estis multaj vojoj por piediri aŭ piedvagi kaj ĝui la belecon de la parko.

Eonoj da erozio kreis interesan miksaĵon de grund-koloroj en la pejzaĝo, kaj la krutaj deklivoj faris la teron ekinundebla. Ĉar ĝi estas tiom malalta, pluvo kolektiĝas de la ĉirkaŭaĵo. La grundakvo portadas mineralojn en la valon kaj, kiam ĝi vaporiĝas, portas ilin al la surfaco, formante sal-tavolojn. Pro tio, strangaj grundaj formacioj alformiĝas sur la kampo. Unu el tiuj nomiĝas Golfludejo de la Diablo (*Devil's Golf Course*); ĝi estas tiel malglata, ke eĉ la diablo mem ne golfludos tie! [*vidu la foton supre!*]

Inter la mineraloj troveblas borakso,



## Larry BENNETT

Larry loĝas kun sia edzino Anna en Boise, Idaho. Helpis traduki lian artikolon membroj de la klubo *Terpomuloj*, inkluzive de Anna, Jim HULL kaj Jody HULL.

[l.j.bennett.engineering@gmail.com](mailto:l.j.bennett.engineering@gmail.com)

kiun oni elfosis dum la malfruaj jaroj de la 19-a jarcento ĝis la fruaj jaroj de la 20-a. En la parko oni konservas kelkajn instalaĵojn de la minoj. Imagu labori en la ĉirkaŭaĵo de varmega akva kaldrono dum la aero atingas 120°F!

La Kastelo de Scotty (*Scotty's Castle*) estas alia vidinda turista loko en la parko, konstruita en la 1920-aj jaroj kiel ripozejo por direktoro el Ĉikago. Estas interesaj rakontoj pri la metodo kiun Scotty uzis por akiri monon de la direktoro, kaj la opinio de la direktoro eĉ post kiam li sciigis, ke Scotty erarigis lin.

Malmultaj hoteloj ekzistas en la parko. Troviĝas multaj kampadejoj kiuj provizas bazajn servojn; ili situas apud parko-sidejoj, butikoj, kaj restoracioj. Iuj havas eĉ duŝejojn kaj trinkakvo. Ankaŭ vera golfludejo troviĝas ene de la parko.

La nacia parko Valo de Morto vere vizitindas! Jen mia plej longa vojaĝo en Esperantujo, kie multaj diversaj aventuroj atendas ankaŭ vin. ★

## Estas malfacile trovi vojon kaj belan kaj fidelan

Nia defio pri E. E. CUMMINGS ŝajne estas ja defia, aŭ eble fortimiga... venis nur kvar tradukoj de la poemo, kiuj tamen estas tre indaj provoj kaj meritas diskuton kaj analizon. Ni esperas ke eble kelkaj aliaj provis, eĉ se vi finfine rezignis kaj nenion sendis por la rubriko.

Leviĝas ĉi-rilate grava demando, ĉu entute eblas redoni poemon el unu lingvo en duan lingvon. Kiam temas pri rakonto, certe oni povas rerakonti en la cel-lingvo kaj la leganto povas sekvi la intrigon kaj ĝui la historion. Sed poemo estas formo tute alia. Ĝi estas pli arta, sekvas malsamajn regulojn aŭ principojn, kaj uzas lingvon ne tute kutime. En poemo, ofte apartaj vortoj entenas simbolojn, historiajn nuancojn aŭ faktojn, aŭ ili ligiĝas pro longa uzado kun konataj fenomenoj. Pensu, ekzemple, pri la angla vorto *Dixie*. Oni povas traduki ĝin esperanten per *la Sudo, la Sudlando, suda Usono*, ktp, sed neniu ebla elekto redonas la senton – kaj kaŭzas la reagojn – de la angla vorto.

Sur niaj librobretroj troviĝas granda kaj impona volumo, *World Poetry* (Norton, 1998). 1238 paĝoj de poemoj el multege da landoj kaj lingvoj, kaj diversaj epokoj. Ĉiuj en angla traduko. Nu, kiam oni legas la poemojn, ĉu oni eĉ konscias pri la formoj aŭ efikoj de la originaloj? Ĉu oni havas saman reagon kiel la naci-lingvaj legantoj? Ĉu poemo egale trafas en la angla, kiel ĝi trafis unue? Kiel oni eĉ taksus tion? Se mi ne scipovas la ĉinan, mi ne povas kompari la tradukon kun la ĉina originalo – mi devas komplete fidi je la tradukisto. Kaj vere, ni kredas ke la emocia reago al tia traduko plej verŝajne



Lee MILLER



Tim WESTOVER

En ĉi tiu rubriko ni prezentas tradukdefiojn por vi. Leginte viajn tradukojn, ni faros resumon de la plej bonaj provoj kaj sukcesoj, kune kun komentoj kaj reagoj pri kelkaj malpli sukcesaj rezultoj. Bonvolu sendi **ne** plurajn diversajn provojn, sed **nur unu** tradukon **antaŭ la 1-a de majo** al:

**[bulteno@esperanto-usa.org](mailto:bulteno@esperanto-usa.org)**

lamas pro la malligiĝo for de la fonto-lingvo kaj fontokulturo.

Eble sama problemo ne tiomas por ni, esperantistoj, kiuj en tiu ĉi rubriko tradukas el konata fontolingvo al konata cellingvo.

La usona poeto E. E. CUMMINGS, verkinto de la ĉi-monata defio, uzas tiun konatan fontolingvon tre nekutime. Rolvortetoj rolas kiel substantivoj. Forestas majuskulaj literoj kaj interpunkcio. (Eble pro tio, la lingvaĵo de Cummings similas certajn neanglajn lingvojn.) Kutimaj adjektivoj kiel *juna* kaj *varma* kaj *densa* havas nekutimajn partnerojn – kiel sonorilo povas esti *juna*, aŭ krio *varma* kaj *densa*? Cummings ankaŭ tre atentis sonon en siaj poemoj, uzante ne nur rimadon fine de la linio, sed interne. Ĉio ĉi kreas densan kaj riĉan lingvo-defion, kaj ni dankas al RW, KG, HF, and CW pro iliaj provoj.

El inter la kvar provoj aperis du “skoloj”. La unua sekvis pli proksime la vortojn de Cummings, fojfoje perme-sante la rimon malaperi aŭ solvante per adasismo. (Jen alia defio por esperant-isto-poeto – ne ĉiuj rimoj estas egalvaloraĵ!) La dua skolo pli fore vagis de la originala teksto por trovi pli taŭgajn rimojn aŭ frapajn simbolojn.

Ekzemple, ĉe la fino de la unua strofo, troviĝas la frazo *with the word love underlined*. En unu tradukprovo ni trovas la vorto *amo substrekita* (rimas kun *forjetita*). En alia, ni trovas la vorton *am’ emfazas stelo* (rimas kun *ŝelo*). *Stelo* certe estas grava simbolo al esperantistoj, kaj uzante tiun vorton, la tradukinto ekvekas tute novan aron de signifoj. La tradukinto tiusence kreas novan poemon el la materialo, kiun unue prezentas Cummings, kaj tiu poemo povas esti pli riĉa por esperantistoj, ol por anglalingvanoj. Kiun aliron vi preferas?

La dua strofo de la poemo prezentas serion de adjektivoj: *a warm thick scream and a keen cold groan*. Iuj tradukintoj uzis la vortofaran povon de Esperanto kaj kreis kunmetaĵojn kiel *varmpeza* aŭ *fridakra*, dum aliaj uzis *varma dika* kaj *akra frosta*. Ĉu *varmpeza* egalas al *varma peza*, aŭ ĉu la iliaj priskribaj efikoj estas samaj?

En la dua strofo troviĝas du anglalingvaj vortoj, kiuj ne troviĝas same unuvorte en Esperanto. Temas pri *gadget* kaj *gangster*. *Gadget* estas ne nur ilo aŭ aparato aŭ maŝino (sufiĉe neŭtralaj vortoj) sed maŝino neesenca aŭ bagatela. Oni ne trovas *gadgets* en fabriko, sed en la kuirejo, por fari tre specifan taskon, aŭ en la poŝoj de riĉuloj. Same, *gangster* ne estas ajna krimulo, sed aparta speco de krimulo, kiu havas la propran tradicion.

Ĉu tiuj kromsignifoj tre gravas por la poemo de Cummings, aŭ ĉu Cummings elektis ilin ĉefe pro la ripeta “g”-sono? Ĉu la poemo multon perdas ĉar la tradukintoj elektis ĝeneralajn vortojn kiel *ilo* kaj *kanajlaro*? Ĉu necesas neologisme krei *gangstero*? Ĉu *gaĝeto*?

En la originala poemo, la *gadgets purred*. Tri el la kvar uzis *zumis* por *purred*, kiu ne estas aparte frapa. Maŝino ofte zumas – la apudmeto ne estas stranga, kiel en la originala. Unu tradukinto tamen elektis *ronroni* anstataŭ *zumi* – la rezulto havas la saman frapan kontraston de karno kaj komputilo kiel en la originalo.

La tria frazo entenas la frazon *the old vine twined* – mem komplika interrilato de sonoj reeĥaj kaj kontrastaj. Tri tradukistoj donis, respektive, *pravito tordita*, *maljuna vit’ serpentis*, kaj *vito kreskis vinde*. Kvara parolis pli svage, pri *kadukeco iam aminda*. Ĉiuj provoj havas meriton, sed kiu plej sukcesas?

La lasta linio prezentas apartan defion. *As [x] as you’ll find* estas ofta anglalingva parolturno, kiu malofte rilatas al trovo aŭ malkovro, sed signifas simple *tre [x]*. Sed ĉi tie Cummings metas ĝin kontraŭ la vorto *lost* por krei la paradoksan-sed-kompreneblan *as lost as you’ll find*. Ĝi estas genia linio, kaj la tradukintoj provis redoni ĝin diversmaniere. Iuj ne provis aŭ povis kapti la duoblan signifon kaj elektis la simplan *estas tute perdita*. Alia uzis la iom peza sed frapa *tiel perditas kiel troveblas*. Se mankas perfekta solvo, kion fari? Ĉu meti piednoton, ĉu simpligi la frazon? Ĉu elekti la vojon fide-lan sed malbelan, aŭ belan sed malfide-lan, neniun perfektan? Jen la eterna problemo de la tradukarto, kaj la fojfoja apero

de bonegaj solvoj estas la granda feliĉo de tradukisto.

Ni sube prezentas du tradukojn de la poemo de Cummings. Ambaŭ kaptas la liniofinajn rimojn – la unua per pli fidelaj sed adasismaj elektoj; la dua, per pli vasta interpretado de la originala poemo.

De RW:

jen homa haŭto forĵetita  
kun fotografaĵo  
tenita en la duono  
de mano kaj la vorto  
amo substrekitita

jen knabino mense mortinta  
kun varma dika kri'  
kaj akra frosta ĝem'  
dum la iloj zumis  
kaj la krimular' estis manĝinta

jen surda muta preĝejo blinda  
kun se en sia spirito  
kaj truo en sia vivo  
kie la juna sonorilo sonis  
kun pravito tordita

jen hundo de ras' ne rekonita  
kun blanka okulo  
kaj nigra okulo  
kaj ties okulparo  
estas tute perditita

De HF:

jen eluzita homa ŝelo  
kun fotoĉifon'  
en manoduon'  
kie la vorton am'  
emfazas stelo

jen knabin' kiu mortis mense  
kun varmpeza kriç'

kaj fridakra ĝem'  
dum manĝis gangster'  
kaj maŝin' zumis dense

jen surdmutas kirko blinde  
kun "se" en la anim'  
kaj truo en la viv'  
kie iam sonis sonoril'  
kaj vito kreskis vinde

jen ia nekonata hundo  
kun blanka okul'  
kaj nigra okul'  
el okul' de l' okul'  
senespera profundo

Por la venonta defio, ni elektis prozaĵon verkitan de rusa/usona verkisto Vladimir NABOKOV el *My English Education* (1967):

The kind of Russian family to which I belonged—a kind now extinct—had, among other virtues, a traditional leaning toward the comfortable products of Anglo-Saxon civilization. Pears' Soap, tar-black when dry, topaz-like when held to the light between wet fingers, took care of one's morning bath... "We could not improve the cream, so we improved the tube," said the English toothpaste. At breakfast, Golden Syrup imported from London would entwine with its glowing coils the revolving spoon from which enough of it had slithered onto a piece of Russian bread and butter. All sorts of snug, mellow things came in a steady procession from the English Shop on Nevski Avenue: fruitcakes, smelling salts, playing cards, picture puzzles, striped blazers, talcum-white tennis balls."

Bonan tradukadon! ★

## A report from the 2010 Zamenhof Symposium

The second annual Zamenhof Symposium at the New York office of UEA attracted an enthusiastic audience of 90 people for a series of presentations about Zamenhof, Esperanto, and several new books. The New York office of UEA played host in the conference room upstairs from the tiny office they share across the street from the United Nations. Neil Blonstein, UEA representative to the UN, set up a display of materials for people to look at while Scott Page manned a table with books for sale. These included two works recently translated into English, the Zamenhof biography by Korzhenkov and the launch of the new Soros book, described below, and the new release of *Poŝtmarkoj el Esperanto*, a book of haiku in Esperanto with English translation. Tom Ecchardt greeted the audience and introduced the speakers: Esther Schor, Ralph Dumain, Sam Green, and Humphrey Tonkin.

Esther Schor returned for a second year and continued her exploration of how Zamenhof's thinking evolved over time. She described how Zamenhof's conceptions of the future had been accurate in some respects, especially regarding proximate events, but how his long-range thinking had been led astray by various mistaken assumptions about how the post World War I order would result. When Zamenhof came to the United States in 1910, he believed that America was the land of the future and believed it would become the center for Esperanto activity. He couldn't foresee the Second World War or the Cold War that would follow, or how global capitalism would



**Steven D. BREWER**

Steve estas profesoro ĉe la Universtato de Masaĉuseco kaj li administras la retejon de Esperanto-USA.

[sbrewer@bio.umass.edu](mailto:sbrewer@bio.umass.edu)

push English into the forefront of world languages for primarily economic reasons.

Ralph Dumain reprised his presentation from the *Landa Kongreso* and spoke about the *Universala Kongreso* of 1910, when Zamenhof came to the United States. With numerous clippings from the Washington newspapers, he showed how the event had been front page news every day, with theater presentations, a baseball game, and even advertisements in Esperanto in the national media. He also described the state of racial segregation in Washington at that time and finished by drawing a connection between William Pickens, the first African American Esperantist, who was described in a poem by Elizabeth Alexander—the same poet who read at President Obama's inauguration—to show how much the country has changed in 100 years.

Sam Green has become well-known for his recent spoken-word performance piece *Utopia in Four Movements*. Using some of the same footage, supplemented with new film plus some archive material, he has created a new half-hour documentary about Esperanto, which was previewed at the symposium. In a moving paean to Esperanto, he presents Esperantists as among the last idealists in a



world that has rejected the power of ideas to effect the course of human events. With a touching series of vignettes, he shows Esperanto at its height, when people believed that Esperanto would ultimately become a common language for humanity and contrasts with today, where the dream of Esperanto, while a reality for those who speak it, has become irrelevant to the people of the world who must learn English to survive.

Humphrey Tonkin primarily described the launch of the new book *Cru-soes in Siberia*. Published originally as *Modernaj Robinzonoj*, it was written by Tivador Soros about his experience escaping from a Siberian prisoner of war camp after World War I. After struggling through the mountains, they made a raft

and traveled downstream, which they abandoned when they realized they were heading for the Arctic Ocean. The book ends when the party reaches a remote mining village, although as Tonkin explained, there is a large portion of the story that was never told: how Soros became involved with the founding of the Esperanto movement in Moscow and how he passed himself off as an Austrian officer to avoid being detained with other Hungarian officers who were kept as insurance to prevent reprisals against leftists in Hungary after the collapse of the Austro-Hungarian empire.

Tonkin had originally made a translation, not for the public, but for members of the Soros family who were unable to appreciate the book in the original Esperanto. Supplemented with additional




De maldekstre: Sam GREEN, Ralph DUMAIN, Humphrey TONKIN, George SOROS, Françoise CESTAC, Esther SCHOR, Neil BLONSTEIN, Jonathan SOROS. Foto danke al Neil BLONSTEIN.

## Strandoj foje estas

Verkis Natan JONATAN, 1959

Elhebregis Ŝajo MOR, 2010

Strandoj foje estas sopiroj al fluo.  
 Mi vidis iam strandon  
 kiu estis forlasita de fluo  
 kun rompita koro de sablo kaj ŝtono.  
 Kaj la homo, kaj la homo,  
 Foje ankaŭ li povas resti  
 forlasita kaj senpova...  
 Efektive kiel bordo.  
 Ankaŭ la konkoj  
 kiel strandoj, samkiel la vento,  
 Ankaŭ la konkoj foje estas sopiroj  
 al la hejmo  
 kiun ni ĉiam amis  
 tiu estis  
 kaj nur estis  
 kaj nur la mar'  
 sole kantas siajn kantojn.  
 Tiel inter la korkonkoj de l' homo  
 kantas al li lia knabeco.



Natan JONATAN

### Symposium (continued from p. 15)

research—in particular with maps showing the route that that Tivadar had taken through the mountains—and a particular fable that George Soros remembered fondly, the new book is now available through Mondial Books.

Near the end of the book presentation, George Soros arrived, accepted a copy of the new book, and spoke extemporaneously for several minutes. He spoke fondly of his father and how the adventures recounted in the book had been told to him as a child. He remembered when his father had founded *Literatura*

*Mondo* (an early literary journal in Esperanto) with Kalman Kalocsay and Julio Baghy, who would go on to become the anchors of the *Budapeŝta Skolo*. And when George said “*Literatura Mondo*” he pronounced it the way an Esperanto-speaker would. He also recounted how, after his family escaped from behind the Iron Curtain, he went to the British Esperanto Association and received help from the Esperanto community. It was clear he remembered the Esperanto community with warmth. After his remarks, someone asked him if he remembered any Esperanto. He replied, “*tra densa mallumo briletas la celo...*” ★

## Vortaroj, vortaroj, vortaroj

Al lernanto de Esperanto kiu jam amasigis al si bazan vortstokon kaj kapablas vortfarade jongli per radikoj, prefiksoj kaj sufiksoj, povas ŝajni ke vortlernado ne plu estas necesa. Tamen, granda parto (iuj dirus, la plej granda parto) de lingvolernado estas vortlernado, kaj esperantisto kiu ĉesas lerni novajn vortojn vere malhelpas sian progreson en la lingvo. Feliĉe, la Interreto provizas nin per multaj vortlerniloj, inkluzive de bonaj vortaroj. Ĉi-sube, mi konigos al vi kelkajn interrete uzeblajn vortarojn kiujn mi trovas aparte utilaj.

En mia lasta artikolo, mi menciis Retan Vortaron <<http://reta-vortaro.de>>. Se vi ankoraŭ ne vizitis ĝin, vi nepre faru tion. Bazite sur la Plena Vortaro, Reta Vortaro estas ampleksa, traserĉebla vortaro kiu enhavas kaj difinojn en Esperanto kaj tradukojn en multajn lingvojn. Ĝi kutime estas la unua vortaro kiun mi konsultas kiam mi renkontas nekonatan vorton en Esperanta teksto.

Lernu, ĉe <<http://lernu.net>> meritas tutan artikolon pri siaj tre diversaj rimedoj por parolantoj de Esperanto, sed ĉi tie mi limigos min al priskriboj de du vortaroj. En la hejmpaĝo de la retejo, estas sufiĉe bona multlingva vortaro. Ĉi tiu vortaro uzas malpli komplikajn lingvaĵojn ol Reta Vortaro, do ĝi estas aparte taŭga por komencantoj, sed ankaŭ pli spertaj esperantistoj povas ĉerpi utilon el ĝi. Ĝi enhavas almenaŭ kelkajn vortojn kiuj ne troviĝas en Reta Vortaro, do se vi ne sukcesis trovi iun vorton tie, indas serĉi ĝin ankaŭ ĉe Lernu.

Tre valora estas ankaŭ la Bildvortaro de Lernu. De la hejmpaĝo, klaku al *Lernado > Vortoj > Bildvortaro* por ĝin atingi.



**Steven CYBULSKI**

Steĉjo estas fervora gramatikemulo. Li nun loĝas en Madisono, Viskonsino.

[stcybulski@gmail.com](mailto:stcybulski@gmail.com)

Tie, oni povas lerni multege da vortoj helpe de bildoj. Se oni alklakas la kategorion pri la kuirejo, ekzemple, oni vidas bildon de tipa kuirejo kun ciferoj apud la tieaj objektoj. Kiam oni movas la muskursoron al cifero, la Esperanta nomo de la apuda objekto aperas. Per la Bildvortaro, oni povas rapide lerni multajn vortojn kiuj rilatas al iu specifa temo.

Kiam vi volas lerni pri-komputilajn terminojn, vi iru unue al Komputeko <<http://komputeko.net>>. Malgraŭ tio, ke ĝi ne enhavas difinojn, ĝi estas vere uzinda. Aldone al tradukoj de tre multaj terminoj, troveblas tie ligiloj al pliaj rimedoj.


Uzante tiujn ĉi vortarojn, vi ĉiam memoru taksu mem la fidindecon de la informoj kiujn vi trovas. Neniu vortaro estas perfekta, kaj ili ofte enhavas misajn difinojn, evitindajn vortojn, kaj aliajn fuŝaĵojn. Indas kompari informojn el pluraj fontoj; se iu vorto estas same difinita aŭ tradukita en kelkaj vortaroj, tiuj difinoj aŭ tradukoj probable estas ĝustaj. Mi esperas, ke helpe de tiuj ĉi vortaroj vi sukcesos vorte pliriĉigi vian uzon de Esperanto. ★

*[Lastatempe aperis ankaŭ la nova retejo <<http://simplavortaro.org>>, kiu prezentas facilan interfacon al la bonega Reta Vortaro menciita supre, kun serĉilo kiu inteligente apartigas kunmetitajn vortojn; jen aparte utila ilo por lernantoj. —Red.]*

Inter la solvintoj ni lotumos \$10-rabaton de la libroservo de E-USA. Ĉiuj membroj rajtas partopreni, sed solvoj nepre alvenu al la redakcio, aŭ poŝte aŭ rete, **antaŭ la fino de marto**. (La adreso de la redakcio troviĝas en paĝo unu.) Bonŝancon! La ĉi-numera krucvortenigmo nomiĝas *Dudek tri el kvindek*.

## Horizontale

- 1 Spac' por io  
 4 Fabela  
 8 PISAĴ'  
 12 Membro  
 13 Nereкта sciig'  
 14 "Nin ĉiam ravas, kion \_\_\_\_ havas."  
 15 Lokoj por spekti filmojn  
 17 Fositaj truoj el kiuj oni ĉerpas akvon  
 18 Ritmoskem', ekzemple en muziko  
 19 *Mr.*, en *Macon*  
 20 Kaŝa teksaĵo, kiun ofte portas monaĥinoj  
 23 (figure) lu, kiu senkomprene ripetas instruon  
 27 Transpag'  
 28 "Ne juĝu pri \_\_\_\_o laŭ ĝia ekstero."  
 30 Arbust' kreskanta en sabla tero, aŭ ĝermandevena nomo  
 31 Pensaĵ'



- 32 "Se \_\_\_\_os la sorto, helpos nenia forto."  
 34 "Nenia konstruo povas esti sen \_\_\_\_o."  
 35 Grupet' de individuoj, ekzemple muzika aŭ raba  
 37 Taĉmento da soldatoj, ofte komandata de kapitano  
 38 Alta montara zon'  
 39 Esprimi enuon  
 41 Maldolĉa, por gusto aŭ koro  
 43 Esprim' de amo  
 44 Esplor' per aparato aŭ nereкта metodo  
 46 En ĉi tiu enigmo, ĉiu literparo en ovala kvadreto estas usona mallongigo tia  
 49 "Ofte ĉapo de kampulo kovras \_\_\_\_ saĝulo."  
 52 Di' de amo en antikva Grekujo  
 53 ,  
 54 Monato inter okt. kaj dec.  
 55 \_\_\_\_ *Pona*, planlingvo fare de Sonja Elen KISA  
 56 Loĝant' de Glasgovo

57 Loko per io karakterizata

## Vertikale

- 1 Trinkaj' por beboj
- 2 "Ju pli oni posedas, des pli \_\_\_\_\_."
- 3 Komerca konkurad'
- 4 Monat' postaprila
- 5 Aparato
- 6 Senprokraste
- 7 p. K., latine
- 8 Aparte aŭ individue
- 9 Ceremoni' religia
- 10 Membro de la idonaska sekso
- 11 Ne, por Niels
- 16 Malega
- 17 Prefikso primitiva
- 19 Inventema

- 21 Metalplat'
- 22 Fordonacis multvalorajon, ekzemple al dio
- 24 "Pro multo da arboj li \_\_\_\_\_ \_ vidas."
- 25 Floraj kunplektaĵoj ĉenformaj
- 26 Ofic', rol' aŭ task'
- 27 Dorsa elstarajo, ekzemple de kamelo
- 29 Kvalito aŭ stato
- 33 "Aliaj \_\_\_oj, aliaj homoj."
- 36 Superstiĉe malbonsanca numeralo
- 40 Perfekta, kvazaŭ supernatura
- 42 Ludkarto unupunkta

## Solvo de numero 2010:6

M	O	N	T	A	J	P	I	T	R	A	
A	D	E	A	M	O	R	I	K	U	K	
S	O	L	A	G	U	T	O	Z	E	B	R
K	R	A	N	I	O	K	D	E	K		
		G	H	S	O	F	J	A			
B	R	U	O	O	M	I	Z	E	R		
E	I	N	S	J	U	D	R	I	S	K	
I	D	I	O	T	I	O	M	P	I	A	
N	I	L	U	M	K	A	T				
	P	E	R	O	S	R	I	B	E	L	
G	R	A	C	D	E	L	I	K	A	T	
H	E	G	T	E	N	A	S	K	O	R	
I	G	I	E	L	E	K	T	I	S	M	

- 45 Farendaĵo, aŭ usona rokbando kiu verkis la kanton "Whip it"
- 46 Fritil'
- 47 Mezurunuo de elektra rezistanco
- 48 Ĉagren' surpriza
- 49 "En sia korto ĉiu \_\_\_' estas forta."
- 50 "\_\_\_ kaj jaluzo estas gefratoj."
- 51 "Ne batalu \_\_\_' el tero kontraŭ kaldrono el fero."
- 53 Mallongigo kun signifo simila al latina etc.

## Senintenca esperantaĵo?



Ho, se nur *Beavis & Buttthead* estus parolinta Esperanton...! Foto danke al Chris ZERVIC.


Pri la enigmo en n-ro 2010:6 respondis dek ok solvintoj: jen nova rekordo! En la lotado gajnis **William PECKENPAUGH**. Gratulojn al li, kaj ankaŭ al niaj aliaj solvintoj: Olga DU TEMPLE, Randy DEAN, Keneĉjo GOLDBERGO, Ray REDD, Peter MCCORQUODALE, Shäri WEBBER-DUNN, Ellen EDDY, Chris WINGROVE, Dave LIND, Vilĉjo HARMON, Briĉjo, Russ WILLIAMS, Arlyn KERR, Ken CAVINESS, Walter MURAWSKI, Sally LAWTON, kaj laste (sed ne balaste) Dave RUTAN.

La solvo por la limeriko-enigmo fare de Russ WILLIAMS estis "Hair".




# New in the E-USA bookstore

All items listed here can be ordered online at <<http://esperanto-usa.org/retbutiko>> or by mail from **Esperanto-USA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530**. More complete descriptions can be found at our website. If a title is out of stock, you can have the online bookstore notify you by email when it becomes available again. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar, all prices are subject to change without notice.




**ELEKTITAJ VERSOJ EL LA SANKTA KORANO**  
Tradukis el la araba Prof. Dr. Italo CHIUSI. Ĉiu el la dek du sekcioj enhavas kelkajn versojn de la Korano, en kaj la araba kaj Esperanto. Mola bindaĵo. 124 p. 1988. Nederlando. **\$11.70**



**LUPO ALBERTO Silver**  
La bestoj sur la bieno McKenzie, kies ĉefrolanto estas Alberto, estas speguloj de la homo kaj ĝiaj atingoj kaj fiaĵoj. Mola bindaĵo. 141 p. 2010. Italujo. **\$12.30**



**REĜO DE LA TERORO, LA (DIABOLIK)**  
**Angela GIUSSANI**  
Tradukis D. BINAGHI, F. ZANONER. Bildrakontoj pri la populara (kaj timinda!) heroo Diabolik. Mola bindaĵo. 140 p. 2009. Italujo. **\$9.90**



**NAIVECO DE PASTRO BROWN, LA**  
**G.K. CHESTERTON**  
Repesaĵo de originala teksto kiu eldoniĝis en 1937. Mola bindaĵo. 220 p. 2010. Usono. **\$12.20**



**PRESENTATION ABOUT UEA AND NASK**  
**Humphrey Tonkin**  
Dr. Tonkin talks about UEA in this speech during the Nord-Amerika

Somera Kursaro (NASK) in 2003. As usual, his masterful presentation skills and clear enunciation make this an enjoyable listening experience. CD. 28 mins. 2010. USA. **\$3.00**



**ETA PRINCO, LA**  
**Antoine de SAINT-EXUPÉRY**  
Fama verko de franco, kiu estis aviadisto en la unua mondmilito. Ĉi-tiu plej nova kaj freŝe reviziita eldono rezultis de granda kun-

laboro organizita de montrealano François LORRAIN. (Detaloj troveblas en *Usono Esperantisto* n-ro 2010:6.) Malmola bindaĵo. 93 p. 2010. Francujo. **\$23.40**